

Sur Posteno

Oficiala organo de IPE - Internacia eldono

Dua jaro
H 28

Aperas dufoje en ĉiu monato

NOVEMBRO (8)
1934

La eldono „Plugilano” en Har-
kovo eldonis novan libron kun
la titolo: FATA MORGANA
(libro n-o 70). Tiu ĉi verko de
M. Kocjubinskij, tradukita en bo-
nan esp-on de Sissler, pritraktas
la batalon de la kamparanoj en
la Ukrainio kontraŭ la riĉaj
grandbienuloj. Tempo: la jaroj
1904—1910. Prezo: f 0.75.
Mendu ĉe EKRELO.

La Kritiko

Oni povas fari la konstaton, ke diversaj homoj timegas kritikon. Kvazaŭ hundo pro ŝtono, tiel ili forkuras, ekkaŭras en angulon, grimacas amare k grumbas. Ili anticipas estas konvinkita pri la bono de sia laboro tiom forte, ke ili mem ne vidas eĉ la plej malgrandan eraron en siaj aferoj.

Kompreneble la „tono faras la muzikon” ankaŭ ĉe la kritikado. Certaj reguloj devas direkti la kritikanton kiel la kritikaton. La kritikanto eraras, opiniante, ke per ĉion superanta memtroŝato li rajtas deklari rusta k malgusta ĉion, pri kio la kritikato eble honeste penis, por fari ĝin kion eble plej perfekte. Do la kritikanto devas taksu la fortojn de la kritikato.

La kritikato ne opiniu, ke ĉiu atentigo (kiu foje eĉ ne atingas la forton de kritikato!) estas direktita kontraŭ la persono, de malamiko de lia persono. Kritiko nur havas valoron, se ĝi baziĝas sur objektiveco, se ĝi tendencas akceli komunan aferon. Ju pli malgrandiĝas la distanco inter la kritikanto k la kritikato, des pli bone por la celo de la kritiko.

La kritiko estas potenca ilo, por la laboristaro, se ĝi kiel memkritiko estas aplikata en laboristaj aferoj. En la Sovet-Unio la memkritiko foje atingas formojn, kiuj povus kredigi, ke ĉio taŭgas tie. Sur tiuj memkritikoj sovetsocialistoj bazas siajn mensogajn asertojn. Ni malfermas sovetsocialian ganton k legas:

„Vilagsovetoj ne plenumas sian devon!”
„La lernejoj estas kontrolendaj pli atente!”

Kiam alproksimiĝis la vintra sezono anoj de laborista klubo en Moskvo publike plendis:

„La laboro komenciĝas, sed sen plano!”

„Ni tuj bezonas novajn ejojn!”

Ke oni atentis plej etan malzorgemon atestas la kritika rimarkigo:

„Kial k-do... ne havigas al ni bet-haktrancilojn?!”

Estas sufiĉe konata la anekdoto, laŭ kiu iu persono, vizitonte Stalinon devis resti 15 minutojn en la atendejo. Tie li aŭdis la voĉon de Stalin, kiu ekscitite kritikegis k insultis iun evidente malzorgulon. La vizitanto ĵus ekvolis kompari la insultaton, kiam la k-do sekretario ridetante diris al li: „Ne timu, he! Estas Stalin. Li ĵus praktikas sian ĉiutagan, kvaronhoran memkritikadon!”

Pozitiva memkritikado estas necesa. Ĝi malkovras mankojn k montras rimedojn por forigi la mankojn. Memkritiko estas signo de forto. Nur forta organismo povas toleri ĝin.

Dum la IPE-konferenco en Lille ankaŭ la memkritikado estis forta. Le IPE-organismo ja povas toleri memkritikon. Hodiaŭ ni povus anstataŭi la kritikajn atentigojn, ĉerpitajn el la sovetsociala gazeto per jenaj:

„SP devas aperi tute regule!”

„Ni garantiu la ekzistadon de SP!”

„Kial multaj IPE-sekcioj ne sendas raportojn k kunlaboraĵojn?”

„Ne skribu kion ajn! Memoru la karakteron de nia gazeto!”

Kaj ĉar ni ĵus parolas pri artikol-skribado ni povus aldoni:

„Kial ni bojkotas konferencdecidojn, uzante en niaj artikoloj (post la konferenco!) „kilometrajn frazojn?”

Ni ja scias, ke tiuj „kilometraj frazoj” havas la saman efikon kiel longega vermicelo: vi glutas k glutas, sed ne venas fino. Kaj fine sekvus lasta, kritika rimarkigo, lasta pro tio, ke ĝi firme kroĉu sin en la memoron:

„Ĉu jam ĉiuj IPE-grupoj estas bazitaj sur la PEK-laboro?”

*) El la PEK-rezolucio: „Ĉiu loka grupo ne fondas en si apartan PEK-filion, sed konsideras la PEK-laboron kiel la bazan taskon de la tuta grupo”.

Nur se ni tenas antaŭ niaj okuloj tiujn taskojn, kiujn ni promesis al ni plenumi, ni evitos fali en lacigan, neagigan memkontenton. La kritiko donas al ni ĉiam novajn instigojn, subtaskojn por plenumi la taskojn k fine atingi celon.

Estas supozeble, ke post iom da tempo ni jam povas presigi aliajn verkaĵojn de kritikemaj k tamen „pozitivaj” IPE-anoj. Hodiaŭ ni jam prezentas artikoleon de k-do, kiu deziras esprimi sian opinion pri EKRELO-libreto legita de li. Ni rimarkas, ke la verkinto tre mildas en la uzado de kritika tendenco. Tamen, ni devas esprimi nian ĝustan opinion. Kritiko ja celas atentigi pri tio, kio estas perfektigenda k ne pri tio, kio estas perfektigita.

Kiel plaĉis al mi la EKRELO-libro: „Batalante por la metalo.” „Komunismo komenciĝas tie, kie aperas la sinforĝesa, venkanta pezan laborpenson, zorgado de vicaj laboristoj pri pligrandiĝo de la laborproduktivo. Lenin”. Tiu cito de Lenin pruvigas, ke la laborista verkisto N. Mihajlov tre bone komprenas la penadojn de metalbrigado por plenumi la kvinjarplanon, por la socialisma konstruado. La plej bonaj ŝturmuloj starigis siajn planojn batalante por la metalo. Estas sciigoj, ke estas ankoraŭ sufiĉe multaj homoj, kiuj estas kontraŭ la agado de la ŝturmbregadoj. Tiuj homoj pensas, ke tiu ŝturmlaboro similas al sklava laboro. Sed oni tute forgesas, kiel estis en la malnova, despota Rusio antaŭ la oktobra revolucio k kiel estas en la kapitalistaj landoj.

Interalie oni aprobis decidon en la koncerna lamenfako kontraŭ fuŝlaboro, por gajni la plej bonan metalprodukon. Tiajn decidojn oni nur povas sukcesigi en lando, kie regas la proletaro mem, sen la „sinjoro desupre”. Tute alie estas en la kapitalistaj landoj. Ju pli da kompanioj fuŝas la aĵojn, des pli granda estas la profito. Tion mi mem spertis dum multaj jaroj kiel lignaĵisto (meblisto). Ekzemple iu kompanio produktas seĝojn. Sed oni plejparte uzas molegan lignon por la malantaŭaj seĝokruroj, por ke ili facile rompiĝu! Ĉu ne eblus

10-4

Tiu k-do, kiuj kun speciala kontento salutis la n-on 26 de SP, kiu estis dekpaĝa, eble salutis kun speciala malkontento salutis SP-on kiu estas kvarpaĝa. Certe niaj „ekonomiistoj” devas esti simulan.

Ni ja ne havas senjundan monujon k devas esti egalige mastriumi! Cetere la gvidadon akceptita en Lille nur aludas pri dekpaĝa gazeto ĝenerale. Do tiun ĉi fojon ni devas agu laŭ citita dokumento! SP n-o 26 devas esti okpaĝa.

La konsolitoj (k ankaŭ la konsolitoj!) dume ne malakceptu reaboni, abonigi k propagandi por SP. IPE-O.

uzi por tiuj partoj pli stabilan ligon? Certe! Sed la kapitalistoj ne bezonas fari tion: per tio oni ja ne profitus tiom multe.

Por aliaj produktaĵoj oni agas laŭ la sama maniero en kapitalistaj landoj. Alie estas ĉe socialisma konstruado: oni profitas tiam, kiam oni ne fuŝas la aĵojn, ĉar oni laboras por si mem k do ne bezonas fuŝaĵojn!

Mi povas diri, ke la libro „Batalante por la metalo” estas bonega. Ankaŭ la tradukinto k la kontrolinto

bonege sukcesis. La libreto estas facile legebla. Oni povas diri: „Ĝi venis de laboristo k iras al laboristoj.”

Mi estas konvinkita, ke la libreto estas tute reala k konscia laboro. La lingvo estas kontinua k belsona. Tamen, koncerne la t.n. novajn vortojn mi ne trovis pli multe ol la vorton „mitingo”. Al mi ŝajnas, ke la konata, kunmetita vorto „kunveno” estas por esp-istaj oretoj pli sonhava ol „mitingo”.

Graŭsdin, Johano, Kanado.

Laboristaj esperantistoj raportas

El la lando de la olivoj

Bonvenu al pejzaĝo romantika de olivoj, citronoj k vinberoj, al kadro rava de kampar' tritika de montaraj, vulkanoj k riveroj!

Jen strofo el poemo invitanta al la 27-a UEA-kongreso kiu okazos en Aŭgusto 1935 en Romo. La poemo aperis en „L'Esperanto”, organo de la Federacio esp-ista de Italio. Suba artikolo de sicilia IPE-ano iomete duŝu la entuziasmon de la „verdaj kavaliroj”, memorigante al ili, ke italiajn cirkonstancojn ne nur karakterizas „olivoj k citronoj”.

Informoj al Italio

Ni deziras informi la eksterlandajn k-dojn pri la lastaj novaĵoj italiaj. Eble la gazetoj de iliaj landoj misinformis ilin pri la nuna stato de la laboristaro en Italio. Nuna regularo de la sindikatoj (italaj sindikatoj ne estas liberaj, sed nature faŝistigitaj) estas jena:

1. La semajna labortempo ne devas superi 40 horojn.

2. La laboristoj devas pagi por subteno al la senlaboruloj la sumon de 1 ĝis 5% de la salajro. Saman kvanton ankaŭ devas pagi la industriistoj.

3. Kromlaboro estas malpermesata. Kompreneble, se la industriaj aferoj necesigas kromlaboron, ĝi estas permesata.

4. Laboristoj 60-jaraj ne devas labori k oni forĵetas ilin por lasi lokon al pli junaj. Tamen, se iuj maljunaj laboristoj okupas gravajn lokojn, oni povas lasi ilin.

5. Virinojn en la industrio k en komercaj oficejoj oni devas maldungi k anstataŭi ilin per viroj, ĉar (tiel skribite) „la kaŭzo de la senlaboreco de viroj originas de la virina laboro. Kompreneble (tiel pluas la skribaĵo) la virinojn, kiuj ne estas anstataŭeblaj oni devas lasi.

Ni klarigas nun, kiel oni sukcesigis la aferojn k kiel kapitalistoj kondutas.

1. Labori dum 40 horoj posemajne ne signifas, ke oni devas labori 6½ horojn potage. Tute ne! Efektive la

labortago havas 8—10 horojn kiel antaŭe. Kiam la horoj sumiĝis je 40, oni devus haltigi la laboron. Sed kvankam kontraŭ permeso, la industriistoj, pretekstante ke la laboro estas grava kromlaborigas (Vidu 3.)

2. La salajroj tagon post tago malaltiĝas k krome oni ankoraŭ devigas la gelaboristojn pagi 1 ĝis 5% por la senlaboruloj. Etburĝoj diras: „Sed pagas ankaŭ la industriistoj!” Kompreneble! Sed tiel parolas tiuj, kiuj ne scias, ke liro aŭ liroj malpli el la taga salajro signifas malpli da pano!

La prezoj de la nutraĵoj kontraŭe altiĝas k la gajno ne sufiĉas. La senlaborulojn oni subtenas per 3 liroj po tago (0.90 sv. fr., 1 ŝ. 2 p.) Viando kostas 8 lirojn po kilo (minimume) ktp.

La luprezoj estas altaj. Por laboristoj ili varias inter 400 ĝis 600 liroj poĵare por unu ejo. Loĝejo kun 3 ĉambroj (inkluzive kuirejo) kostas 1800 lirojn poĵare. Multajn ne pagipovajn laboristojn oni forĵetis el la loĝejoj. La komunumo pretigis kolektivajn loĝejojn aŭ dormejojn, sed kompreneble nur elspezis malgrandan sumon por tio.

Vaguloj plinombriĝas, precipe junaj. Ili vagas tien k reen, ĝis ili fariĝas ŝtelistoj.

3. La ĉefoj de la sindikatoj diris, ke malaltigante la semajnan labortempon je 40 horoj k malpermesante la kromlaboron, la krizo iomete ŝanĝiĝus k multaj senlaboruloj povus trovi laboron. Ĉiuj marksistoj komprenas, kia fiago estas tio. La kromlaboro estas malpermesata. Sed kompreneble, se la industriistoj (laŭ deklaro de la sindikatoj) bezonas kromlaboron en gravaj okazoj, ili povas ĝin devigi.

4. Rilate maljunajn laboristojn oni povas diri, ke vane oni serĉas ilin. Jam de longa tempo oni forĵetis ilin por uzi pli junajn virojn aŭ pli bone junulojn k junulinojn, kiujn oni povas ekspluati pli bone.

5. La faŝistoj, ne plu sciante kion

fari por kaŝi siajn fiagojn k industriajn malsukcesojn nun diras, ke la kaŭzo de la senlaboreco estas la virinoj! Tromulte da ili oni funkciigis en la industrio k tiel forigis la virojn. Ĉiuj bone komprenas, kiom fuŝa estas tiu aserto. Por kaŝi la mankon de la kapitalista sistemo ili nun volas surŝultrigi al la virinoj la malbonaĵojn, kiujn ili mem faris.

Dum la milito, kiam laboristinoj ankaŭ fabrikis bombojn por mortigi aliajn laboristojn oni ne diris tion. Tiam oni flatis al ili. Ankaŭ se la virinoj tiam portis silkŝtrumpojn la etburĝoj diris nenion, ĉar la virinoj ja laboris por savi la patrion (t.e. kapitalismon).

Ni pensas, ke sufiĉe ni skizis la situacion kiu formiĝis post la ventaj babilaĵoj de la gazetoj, laŭ kiuj la krizo preskaŭ malaperis. Ni lasas la konkludon al ĉiuj laboristoj!

Latvio

Pri minorita problemo

Proletesp-istoj en Latvio eldonis hektografitan organon „Ruĝa Informilo”. El n-o 1 (Nov. 1934) ni ĉerpas ĉi suban artikolon. Ni atentigas, ke ni en la gazetpakoj de SP n-o 27 dissendis po kelkaj ekzempleroj de „RI” k petas, (se tio ne jam okazis) ke la SP-agentejoj nepre zorgu por plua distribuado al la koncernlandaj IPE-instancoj (estraro, PEK ktp.)

En Latvio la problemo pri minoritatoj estas unu el la plej gravaj, ĉar ĉe ni estas la sama kvanto da minoritatoj, kiel en la aliaj baltaj ŝtatoj, Litovio k Estonio kune. Jen, statistiko. En tuta Latvio estas 1.900.000 da loĝantoj. El ili estas 500.000 minoritanoj (rusoj, germanoj, judoj, poloj) = 27%. La nombro de urbanoj en Latvio estas 700.000. El ili estas 270.000 minoritanoj = 40%. En la ĉefurbo Riga loĝas 380.000 homoj. El ili 150.000 estas minoritanoj = 45%.

Kvankam Latvio estas membro de la Ligo de la nacioj, kvankam ĝi libervole deklaris la rajton de la minoritatoj pri memapartiĝo, tamen tuj post la venko de la malkaŝa faŝismo en Latvio la latva burĝaro ekprovis transformi la klasbatalemon de la latvia proletaro en nacibatalon, simile al la eksperimentoj de la germanaj naci-faŝistoj.

Latvia faŝistaro ekkulpigadis la minoritatojn, ke ili regas en Latvio. La faŝistoj forprenis la lastajn restojn de minorita, kultura aŭtonomieco, kiun latva burĝa demokratio solene donis al la minoritatoj antaŭ 16 jaroj. Oni

maligis ĉiujn ŝtatajn subtenojn al la minoritaj, lernejoj, bibliotekoj, klerigaj organizoj, maldungante minoritajn oficistojn, malpermesante paroli minoritlingve k uzi la koncernan lingvon en oficialaj institucioj.

Ĉiuj elpendaĵoj, reklamŝildoj minoritlingvaj estas malaperigitaj. La faŝistaro komencis malestiman rilaton al vastaj rondoj de etburgara, minoritata etvendistaro. Ili alvokis aĉeti nur de „honestaj, latvaj komercistoj” k eviti „fremdnaciojn”. Sed kompreneble la latva faŝistaro ne tuŝas la grandsuman kapitalon de minoritaj fabrikantoj k bankoj, ĉar laŭ esenco ĉiu faŝismo estas servanto de financa kapitalo.

Per unu pugno faŝistoj furioze frapas la kapon de la minoritoj, per la alia ĝi karese allogas la minoritojn al „kunlaboro”, al „ŝtata rekonstruado”. La burĝaro intencas trompi la laborulajn amasojn de la minoritoj, efektive farante el ili sklavojn de sia faŝista ŝtato.

Tamen, grandaj amasoj komprenas la rabeman artifikon de la faŝistaro. La latvia kompartio laboras por la rajtoj de la amasoj de minoritoj. Nur per proleta diktaturo la problemo ĝuste povas esti solvata laŭ ekzemplo de Sovetio, kie ĉiu minorito havas sian veran kulturajn, lingvan liberon, kie ĉiu nacio povas disvolviĝi laŭ sia nacia specifo.

abelujon en la lerneja mastrumo. Ĉiu lernanto havas po 1 kokino k 1 kuniklo. La lerneja mastrumo donis profiton de 6 mil rubloj jare. La mono estas destinita por plibonigo de la lernejo k de la lernantara vivo.

La lernantoj ĉiutage havas trifojn manĝotempon en la lerneja manĝejo: matene, tagmeze k vespere. La lernantoj esperas havi en la venonta jaro po 2 kunikloj k 2 kokinoj.

Aleksandr Erjuŝin, Arĥangelsk.

Grekio

Esperanto je servo de la proleta movado.

(El la mallibereja, proleta esp-gazeto „Ekmoviĝo”).

En nia lando pro multaj kaŭzoj la esp-movado ne estas konata al proletamasoj. Se iu konatiĝus kun ĝi, li eble miskomprenus ĝian rolon, aŭ konsiderante ĝin kiel privatan aferon, aŭ kontribuante al ĝi malĝustajn multfoje kontraŭrevoluciajn tendencojn. Oni karakterizas nian movadon ofte reakcia pro la fakto, ke ĝia deveno estas burĝa.

Efektive, en klasa socio ekzistas neniam forma de socia vivo ekster la klasa lukto. Al tiu fenomeno estas submetata ankaŭ la lingvo, sekve ankaŭ esp-o. Sed la Marksismo-Leninismo ne instruas aŭ io estas burĝa aŭ proleta k nenio plu, aŭ se io havas burĝan devenon, do ĝi ne taŭgas por la proleta. Kontraŭe, Marks, Engels, Lenin instruas al ni, ke ni devas akcepti ĉion utilan de la burĝaro k utiligi ĝin por la proleta movado k ĝenerale por socialismo-komunismo k forĵeti ĉion malutilan. Kaj tion, kion ni transprenas, ni ellaboros, pliperfektigos, adaptas al niaj propraj, proletaj celoj.

Tiel estas ankaŭ koncerne esp-on. Esp-o kiel internacia helpa lingvo, la sola lingvo de la amasoj montriĝis kiel plej taŭga lingvo por proleta, internacia korespondado. Ĝia uzado kreskas de tago al tago. Ĝi pli ampleksiĝis mondscale inter proletoj. En la unuaj vicoj troviĝas niaj klasfratoj en Sovetio k Bulgario.

Kvankam malfrue, tamen ni devas sekvi la ekzemplon de niaj eksterlandaj fratoj por aldoni al nia armilaro esp-on en Grekio, metante la lingvon je la servo de la grekia, proleta movado, forbatante ĉiujn malĝustajn konceptojn pri burĝeco, neutraleco k sennacieco de esp-o.

G. L-o

Adreso de IPE-Oficejo, EKRELO, Sur Posteno: Postbox Z 5, Amsterdam-Z., Nederland

Ekskurso al la Nordo

Lerneja kolhozo

La tuta mondo scias, ke en USSR ekzistas tute alia ordo sur ĉiu flanko de socia vivo. Laboristoj k kamparanoj, prenante en siajn manojn la potencon, tute ŝanĝis la aspekton de la interna vivo de nia respublikaro.

Konsideru ekzemple la lernejojn. Estas konate, ke la soveta potenco multe atentis la popolklerigon. Ĝis la revolucio pli ol la duono de la loĝantaro el laboristoj k kamparanoj ricevis neniun klarigon. Kutime estis malfacile, renkonti en rusaj vilaĝoj eĉ unu personon scipovantan legi k skribi. Analfabeteco estis unu el la fundamentaj ŝtonoj de la cara sistemo.

Nun en USSR ekzistas sepjara deviga, ĝenerala studado en lernejoj. La libro k la ĵurnalo intensive penetris la laboristan k kamparanan vivon. Analfabeteco tute malaperis en USSR.

Ni nun rakontu, kiel sovetinfanoj en etnacia regiono, kreinte k mastrumante propran, malgrandan kolhozon sukcese en la praktiko lernas konstrui la socialismon. La priskribata lernejo estas en norda vilaĝo, malproksima de kultura centro (proksima centro Arĥangelsk distancas 750 km.)

En norda, soveta provinco ekzistas etnacia regiono *Komi*. Dum kara tempo jen estis la plej ekspluatata norda gento. Analfabeteco estis 100%. Ne ekzistis genta alfabeto. Rusa lingvo regis tie plene.

Nun ĉio ŝanĝiĝis. La *Komi*-civitanoj sukcese disvolvas sian nacian kulturon (laŭ enhavo socialistan). Infanoj estas edukataj en lernejoj en la lingvo de la gento *Komi*, kiu nun havas laŭtitan alfabeton.

Jen, en tiu regiono estas vilaĝo *Nobel*, kies gvidanto, la aktiva instruisto Jaborov Pavel antaŭ 5 jaroj ini-

ciatis organizi lernejan legom-plantejon. La lernantoj prilaboris 1½ hektarojn da marĉa grundo. Fervora laboro donis rezultojn. Aŭtune sur la kampo kreskas diversaj legomoj k terpomoj. Tio okazis antaŭ 5 jaroj. Nun la spaco de la legom-plantejo kvarobliĝis. Poste la lernantoj decidis aranĝi koko-mastrumon. La lernantoj kolektis eĉ la kamparanoj 700 ovojn. Oni decidis memstare fabriki „inkubatoron”^{*)}. Ĝi estis tute primitiva, farita el barelo kun kaldrono. Tiu inkubatoro donis vivon al 80 kokidoj. Multe da ĝojo estis pro tio en la lernejo. La kamparanoj interesiĝis pri tiu mirinda vapormaŝino, kiu anstataŭas la laboron de multaj kokinoj. Post la unua sukceso la lernantoj decidis konstrui pli bonan inkubatoron. La instruisto Jaborov legis multajn specialajn librojn k fine skizis projekton. La lerneja, meblista laborejo konstruis laŭ la projekto novan inkubatoron por 600 ovoj. Tio estis tute mirinda okazintaĵo por la tuta regiono. Nun la lernejo havas 70 maturajn kokinojn k 120 kokidojn.

Kunikloj en la lernejo aperis tute okaze. Pioniro Karmanov Miŝa de iu parenco donace ricevis unu bonrasan kuniklinon. Li alportis ĝin en la lernejon k diris al la k-doĵ: „Jen, por la lernejo mi donacas la besteton!” Virkuniklo estis trovata en la vilaĝa kolhozo k jen post duonjaro en la lernejo aperis 20 belegaj kuniklidoj. La infanoj zorge vartis la bestetojn. La lignaĵista laborejo fabrikis trietaĝan kaĝosrankon „laŭ lasta, teknika vorto!”

Sed ĉio ĉi ne kontentigis la entuziasmulojn. Estis akirataj 2 porkoj k 2 karpoj. Poste apud la lernejo aperis 19 abelujoj.

Rezulte po 10 lernantoj havas 1

^{*)} inkubatoro: aparato por kovado.

PEK-fronto

Zigzago tra la aro de PEK-bultenoj esp-aj

Ofte oni ne havas komprenon pri la eroj, kiuj formas tuton. La tuto en tiu ĉi artikolo estas la aro de PEK-bultenoj. La eroj estas la diverslandaj PEK-organoj. Do, por ke ni refreŝigu aŭ akiru komprenon pri la esp-a PEK-bultenaro, ni aranĝu mallongan revuon, en kiu ni prezentas unun post la alia la diversajn eldonaĵojn de la proletesp-ista entreprenon PEK. Volante procedi laŭ alfabeto ni komencu per Britio. Certe vi jam konas la helverdan kovropaperon kun la ruĝa surskribo „Britia Bulteno PEK”, kiun ambaŭflanke apudaj verdaj steloj sur ruĝa fono. Speciala avantaĝo de la bulteno estas, ke la artikoloj plejparte estas ne longaj. Ni konkludas, ke oni per zorga elekto k redakto klopodas variigi la enhavon. La limigita spaco (kiu karakterizas ĝenerale niajn PEK-bultenojn) do nur permesas akcepton de etaj artikoloj. Kaj tio estas bona!

Kelkfoja, ironia rimarkigo interrompas la unutonecon de tiu aŭ alia artikolo. En la septembra eldono estas folio de GLEA-PEK. Per tiu aranĝo ankaŭ raportoj de la germanaj k-doĵ trovas vojon al la ekstera mondo.

Britia PEK-bulteno regule aperas sur ok paĝoj duonfoliaj. La aspekto estas alloga k tiom klara, kiom permesas hektografado. La desegnoj, ĝenerale unikaĵo por PEK-bultenoj, ne ĉiam parolas senpere: oni foje devas „diveni”!

Notu ankoraŭ jenan atentigon, kiu aperis en la septembra n-o: „Atentu, Ni volas ankoraŭ pli vaste sterni nian reton inter la neesp-istaj laboristoj. Por helpi realigi tiun celon necesas, ke nia nuna, nacilingva PEK-bulteno ‚Contact’ transformiĝu en presitan gazeton. Nepra tuja bezono estas aro da k-doĵ, kiuj regule verkos kontribu-aĵojn. Ĉiu regula kontribuanto ricevos la gazeton, ĉu aŭ ĉu ne lia materialo estas uzata.”

La britiaj PEK-anoj do intencas eldoni presitan gazeton! Ĉu PEK progresas aŭ ne?

Ĉinio. La „Ĉina PEK-bulteno” regule atingas siajn internaciajn legantojn k utiligantojn. Ĉiniaj PEK-anoj komprenas, pri kio neaziaj laboristoj ekpensas aŭdante pri Ĉinio: ĉiu n-o de Ĉina PEK-bulteno enhavas raporton aŭ sciigojn pri la ĉiniaj sovetaĵ provincoj.

La hektografita bulteno estas sufiĉe klare presita k lingve bona. La oktobra n-o montras i.a. desegnan skizon pri la situo de la sovetsprovincoj. Tamen, la desegno estas ne sufiĉe klara. Ĉar la intereso pri tiaj desegnoj sen-

dube estas granda k represio en nacilingvaj laboristgazetoj ebla, niaj ĉiniaj k-doĵ devas atenti pri tio.

Bulgario. La Plovdiva sekcio de BULEA eldonas PEK-bultenon, kiu de kelka tempo regule aperas. Konsiderante la situacion, en kiu la bulgaraĵ k-doĵ laboras, ni devas admiri iliajn persiston k fidelon. La PEK-bulteno respegulas la humoron en la laboristaj amasoj respondi la atakon de la faŝismo per kontraŭatako. La preso ne ĉiam estas klara. Sed tion kaŭzas la manko de teknikaj rimedoj ĉe niaj subtere batalantaj k-doĵ.

Francio. Titolo: PEK-bulteno franca. La enhavo grandparte konsistas el tradukitaj gazetartikoloj. Tiu fakto supozigas, ke la grupa PEK-laboro ne, aŭ malbone funkcias.

Lingve la franca bulteno estas perfektigebla. Eraroj kiaj ekz.: „... multegaj da laboristoj devis foriri pro manko de placo” ne plu devus aperi en PEK-bultenoj.

La rubriko „Sub franca imperialismo” estus pli bona, se almenaŭ de tempo al tempo aperus originale verkitaĵ aŭ verkigitaj artikoloj de k-doĵ troviĝantaj en la koloniaj regionoj.

La PEK-bulteno multe gajnas, se oni aranĝus ĝin laŭ pli oportuna formo, desegnu simple, sed bonaspektan kapon k klopodus zorgi pri klara preso. Ni ne forgesu memori, ke le franca PEK-Centro eldonas la bultenon regule k tio do estas granda progreso....

Japanio. Jen, PEK-bulteno japania en nova vesto. Ruĝa la kapsurskribo, blua la teksto. Estas vere, ke informo el aziaj landoj ne ofte sukcesas venki la vojon al aliaj landoj. La kutimaj, perĵurnalaj raportoj nur peras malkompletan aŭ fuŝan impreson. Detaloj jam tute ne „antaŭokuliĝas”. La Japania PEK-bulteno ĉiam enhavas tiajn detalojn. Kelkfoje la maŝinskribita teksto estas anstataŭata aŭ daŭrigata per manskribita: signo, per kiom da sindono la japaniaj PEK-anoj laboras. Japania PEK-Centro jam ekentreprenis forigi la mankon pri korespondantoj en diversaj japaniaj lokoj. La PEK-bulteno estas teknike bone aranĝita. Faritaj preeraroj ofte estas postkorektataj mane.

Saarregiono. Saarregiona PEK akiris multan signifon pro la teta politika situacio, al kiu turniĝas tutmonda atento. Konsekvence saarregiona PEK staras en la signo de la plebiscito, okazonta 13.1.35.

En la oktobra n-o la SAAR-PEK-anoj turnas sin al la alilandaj PEK-filioj per jena alvoko: „Ni intencas eldoni germanlingvan bultenon ‚Kion diras la mondo pri Saarproblemo?’ Pro tio sendu kolektivajn instigleterojn de

organizoj k laborejoj por plebiscito. Ankaŭ la tagĵurnaloj laboristaj uzos tiun materialon. Montru internacian solidaron k helpu al ni!” Do ni helpu!!

La lingvo en la bulteno ne ĉiam estas glata. Akuzativo k kunmetitaj tempoj iom forglitas el la regado de la verkintoj. Pli bonigu! Ekstera aspekto estas bona. Saarlanda PEK faras gravan, klasbatalan laboron.

Per tio ni dume finas nian revuon. Pri la aliaj PEK-bultenoj ni skribos alian fojon. Jam nun ni povas fari kelkajn konkludojn. Pri la lingvonivelo ni hodiaŭ ne parolu. Necesas, ke la PEK-anoj tiurilate enkorigu la direktivojn de la PEK-rezoluĉio tiel, ke post kelka tempo ni povu konstati progreson.

La maniero reprodukti geografiajn skizojn pri la situo de certa regiono estas bona k aplikenda pli ofte. Saarlanda LEA jam publikigis skizon pri la Saarregiono. Tiaj mapetoj*) pli intensivigas la intereson pri la koncerna „PEK-regiono”.

Ofte stariĝas la demando: „Ĉu la eldonkvanto de tiu ĉi bulteno estas granda?” k oni ne scias respondon. La konigo de la eldonkvanto de PEK-bultenoj krome havas statistikan valoron. Sur la PEK-bultenoj do troviĝu indiko pri eldonkvanto.

Pri la utiligo de la esp-PEK-materialo ni aŭdas nur hazarde. Necesas do, ke PEK-instanco aŭ PEK-ano ĉiam raportu regule k certe pri la utiligo, represio en nacilingvaj laboristaj ĵurnaloj ktp. Se vi volas, ke tiaj informoj havu instigan kapablon k statistikan valoron, vi do regule sendu informojn pri utiligo k represio (en kiu ĵurnalo, kiam k kio) al la PEK-Centro k al la redakcio de SP.

*) mapo: geografia karto.

Korespondadu!

Tarifo por korespondado: trilingva anonco kostas 2 responkuponojn. Ĉiu plia linio kostas 1 responkuponon.

KANARIAJ INSULOJ (Hispanio)

Esp-grupo dez. koresp. kun sovetsianoj k azianoj pri ĉiuj temoj hispane, france k precipe esp-e.

Adreso: José Camino, Triana 11, Las Palmas.

SVEDIO

Konversacia grupo dez. grupan korespondadon kel, pĉt. Respondo garantiata. Adreso: Esp-grupo, k-do E. H. Eklund, Arosorden Vesteros.

SOVETIO

K-do Jukov S., vtuzgorodok, dom 22, km. 20, Sverdlovsk, dez. kor. kun gekdoĵ el Francio, Usono kaj Aŭstralio pri literaturo, fotografado kaj interŝ. fotografaĵojn.